

SESA DIMANĈO DE LA ORDINARA TEMPO – 12an de februaro 2012

LA LEPRO FORIĜIS DE LI, KAJ LI FARIĜIS PURA –Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Marko 1, 40-45

En tiu tempo venis al Jesuo leprulo, kiu genuiĝis antaŭ Li, petante helpon. Li petegis: «Se Vi volas, Vi povas min purigi». Tiam kortuŝite, Jesuo etendis la manon kaj tuŝis lin, dirante: «Jes, Mi volas: resaniĝu!». Tuj la lepro foriris de li, kaj li fariĝis sana.

Poste, severe avertinte lin, Jesuo tuj forsendis lin, dirante: «Zorgu, ke pri tio, kio okazis al vi, vi nenion diru al iu; sed iru, montru vin al la pastro, kaj oferu tion, kion Moseo ordonis, por atesto al ĉiuj de via puriĝo».

Li eliris, sed tuj komencis rakonti kaj disfamigi la okazintaĵon, tiel ke Jesuo ne plu povis malkaŝe eniri en urbon. Pro tio Li restis ekstere en dezertaj lokoj; sed el ĉiu regiono oni venadis al Li.

La bona novaĵo kiun Jesuo komunikas al la homaro estas ke Dio ne flankenmetas ajnan personon. Estas la religio kiu dividas la personojn inter puraj kaj malpuraj, meritoplenaj kaj ne, sed ne Dio. Kiel diros Petro en la Agoj de la Apostoloj, "Dio montris al mi ke oni ne devas nomi profana aŭ malpura iun ajn individuon". Tiu estas la temo kiun prezentas al ni evangeliisto Marko en la unua ĉapitro per la epizodo de la leprulo.

"En tiu tempo venis al Jesuo leprulo", la rolanto estas anonima. Kaj kiam en la evangelioj iu rolanto estas anonima tio signifas ke tiu estas

reprezenta rolanto, tio estas individuo en kiu ĉiu ajn, kiu vivas similan situacion, povas sin identigi. La lepro tiutempe estis konsiderata puno de Dio pro difinitaj pekoj kaj oni ne resaniĝis de lepro.

En la tuta Malnova Testamento oni rakontas nur du resaniĝojn de lepro, unu de Maria, la fratino de Moseo, fare de Dio mem, kaj la alian de Eliŝa, al la mano de iu pagano. Nur du resaniĝoj do. La lepro estas konsiderata puno de Dio pro difinitaj pekoj, pro kiuj la leprulo ne vekis kompaton, li devis vivi for de la vilaĝoj, flankenlasita. Li estis praktike vivanta kadavro, kaj precipe li ne povas nek alproksimiĝi nek esti alproksimigata.

Nu ĉi tie male la leprulo malobservas la leĝon. Li iras al Jesuo kaj lin preĝpetas surgenue. «Li petegis: "Se Vi volas, Vi povas min purigi"». Li ne petas esti resanigita, ĉar estis sciante ke de lepro ne eblis resaniĝi. Li petas esti purigata. En la tuta peco neniam aperas la verbo "kuraci aŭ resanigi", sed ĉiam tri fojojn, kio indikas kompletecon, la verbo "purigi", tio estas li volas almenaŭ la kontakton kun Dio. Li perdis ĉion, la familion, la amsentojn, la geamikojn, kaj li perdis ankaŭ Dion, li vere sentas sin fiaskinto, forlasito.

Tiam li petas almenaŭ la kontakton kun Dio, ĉar la religio lin metis en senesperan kondiĉon. Li estas malpura, la ununura kiu povas fopreni de li la malpuron estas Dio, sed, ĉar li estas malpura, li ne povas sin adresi al Dio. La senespero do plej kompleta. La reago de Jesuo al tiu pekulo – laŭ la tiuepoka kulturo kiu daŭrigas peki malrespektante la leĝon – estas kompatato. La vorto "kompatato" indikas dian senton per kiu oni redonas vivon al tiu kiu vivon ne havas.

"Etendis la manon". Jen ĉi tie kreas iom da alarmo tiu esprimo, ĉar la evangeliisto ĝin prenas el la libro de la Eliro, de la listo de la dek plagoj, kie etendi la manon estas ĉiam agado de Dio aŭ de Moseo kontraŭ la malamikoj de lia popolo, por ilin puni.

Tiam ne sciante kiel finiĝas la epizodo, la leganto, la aŭskultanto sin demandas: Kion li faras, ĉu li lin punas? Ĉar li estas pekanto kiu daŭrigas malrespekti la leĝon. Kaj poste li lin tuŝas. Ne estis necese tuŝi malsanulon, leprulon. Kiom da fojoj Jesuo sanigis nur per la povo de sia vorto. En tiu kazo kial li lin tuŝas? Li lin tuŝas ĉar tio estis malpermesata.

Kaj kio okazas? *"Jes, Mi volas!"*. La volo de Dio estas la elimino de ĉiu marĝenigo realigata lianome, tiel forstrekante definitive porĉiame la

kategorion de la malpuruloj. Ne ekzistas personoj malpuraj por la Sinjoro. *“Jes, Mi volas: resaniĝu!”*. Kaj Jesuo, lin tuŝante, malrespektas ankaŭ li la leĝon kaj ekde tiu momento, rite, jure, li iĝas malpura.

“Tuj la lepro foriris de li, kaj li fariĝis sana”. La trian fojon aperas la verbo “purigi”. Kiujn meritojn havis la leprulo por esti purigita? Neniun, li eĉ daŭrigis malrespekti la leĝon. La evangeliisto estas prezentanta la novaĵon de Jesuo: ke la amo de Dio ne estas altirata de la meritoj de la personoj – tiu leprulo havas neniun meriton – sed de iliaj bezonoj. Kaj precipe la granda novaĵo: ne estas vere, kiel instruas la religio, ke la homo devas sin purigi por alproksimiĝi kaj akcepti la Sinjoron, sed veras la malo, akcepti la Sinjoron estas tio kio purigas la homon.

Tiu estas la bona novaĵo portata de Jesuo. Sed ĉi tie ŝajnas ke Jesuo abrupte ŝanĝas humoron. *“Kaj”,* ne lin *“admonante”* sed *“severe avertinte lin, Jesuo tuj forsendis lin”*. Kial? Eventuale Jesuo estus devinta lin severe averti antaŭe, kiam tiu pekulo malrespektis la leĝon kaj alproksimiĝis al li. Kial li severe avertas lin nun? Kaj precipe de kie li lin forsendas? Li severe avertas lin pro la fakto ke li kredis ke Dio lin ekskludis de sia amo.

Kaj li lin forsendas de la simbola ejo, de la sinagogo, de la religia institucio, kiu male instruis tiun teruran bildon de iu Dio kiu minacis, punis kaj forsendis de li la personojn. Jen kial Jesuo lin severe avertas. Kiel vi povis kredi ke vi estis forlasita de Dio, malproksima de Dio? Kaj poste li diras al li: *„Zorgu, ke pri tio, kio okazis al vi, vi nenion diru al iu”*, ĉar li devas unue konsciiĝi pri tio kio okazis al li, *“Sed iru, montru vin al la pastro”*.

Kial *“montru vin al la pastro, kaj oferu tion, kion Moseo”* ne Dio, *“ordonis, por atesto al ĉiuj de via puriĝo.”*?

Lepro estas ĝenerala vorto per kiu oni indikis aliajn malsanojn de la korp- aŭ de la krani-haŭto. Kaj de tiuj oni povis resaniĝi. Do por povi reeniri la vilaĝon, la familion, necesis sin ekzamenigi de la pastroj, kiuj atestis ke la persono estas sana. Kaj kompreneble tiu ekzameno ne estis senpaga, sed oni devis pagi eĉ tri ŝafidojn, aŭ unu se la persono estis malriĉa.

Praktike Jesuo lin invitas kompari du manierojn de Dio, la Dio de la pastroj, iu Dio tropostulema, iu Dio kiu forlasas, iu Dio kiu flankenmetas, kaj la Patro de Jesuo kies amo estas senpage disdonata. Kaj fakte Jesuo diras *“por atesto”*, ne *“por ili”*, sed la teksto diras *“kontraŭ ili”*. La evangeliisto referencas al la libro de Readmono, ĉapitro 31, versiklo 26, en kiu Moseo

diras: "Prenu tiun ĉi libron de la leĝo, ĝi restu al vi kiel atestanto kontraŭ vi", kiel malrespekto de la leĝo, de la volo de Dio.

Nu la leprulo komprenis kaj ne plu iras ĉe la pastrojn. Kaj fakte "*Li eliris*", li forlasas tiun institucion kiu igis lin malpura, kaj "*tuj komencis rakonti*". La evangeliisto utiligas por tiu individuo la saman verbon utiligatan por la instruo de Jesuo. "*Kaj disfamigi*", ne "la okazintaĵon", kiel estas ĉi tie tradukita. Estas la greka vorto "logos" kiu signifas vorton, la mesaĝon. Tio estas, li ne tiom anoncas la fakton okazintan al li, sed li iras anonci la novaĵon. Dio ne flankenmetas, Dio ne ekskludas, Dio ne lasas ke la personoj restu for de li, sed lia amo estas adresata al ĉiu ajn.

Tiu estas la mesaĝo kiun la iama leprulo iras atesti. "*Tiel ke*" kaj ĉi tie la evangeliisto ne metas la subjekton Jesuo, ĉar li identigas Jesuon kaj la leprulon kiel se ili estus unu nura persono. La mesaĝo kiun la leprulo estas disfamiganta estas ke Dio ne estas kiel la pastroj kredigis al li. Li ne diskriminacias, ne flankenmetas la homojn, sed al ĉiuj li proponas sian amon. "*Tiel ke ne plu povis malkaŝe eniri en urbon.*"

Kompreneble la evangeliisto referencas al Jesuo. Jesuo, tuŝante la leprulon, iĝis ankaŭ li malpura kaj do ne povas malkaŝe eniri en urbon, ĉar ankaŭ li devus unue submetiĝi al la purigaj ritoj. "*Pro tio Li restis ekstere*", ĝuste kiel la leprulo, "*en dezertaj lokoj*"; la lokoj kie devis resti la malpuraj personoj. Sed, kiel venis la leprulo je la komenco de tiu ĉi peco, jen ke "*el ĉiu regiono oni venadis al Li.*"

Ĉiuj personoj kiuj sentis sin flankenmetitaj, ĉiuj personoj kiuj sentis sin rifuzitaj, ĉiuj personoj kiuj sentis sin malestimataj, jen ili alkuras al Jesuo. Li estas iu Dio kiu purigis la personon, ĝin igis komplete en komuneco kun li. Estas tiu la bona novaĵo kiun la personoj atendis, aparte la plej malproksimaj, la plej forlasitaj, la plej flankenmetitaj kaj malestimataj de la religio.